Salutmesaĝo de Unesko al la partoprenantoj de la 2-a VK 2021

De: Sinjoro Tawfik Jelassi, Vic-ĝenerala direktoro de Unesko, respondeculo pri komunikado kaj informado

Sinjorino prezidanto,

Nome de la Ĝenerala Direktorino mi elkore dankas al vi pro via letero, en kiu vi invitas ŝin partopreni en la tutmonda kongreso de Universala Esperanto-Asocio, kiu okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio.

Unesko estas dankema al vi pro tiu invito partopreni en tiu grava jara aranĝo de la Esperanto-komunumo. Tiu evento esprimas trafe la viglecon de UEA. Ĝi ankaŭ spegulas ties ĵusajn pozitivajn iniciatojn.

Unesko estas feliĉa kaj fiera labori flanke de UEA ekde jardekoj por antaŭenigi la kulturan kaj lingvan diversecon, same kiel por antaŭenigi la gravecon de tiu diverseco por konstrui kaj fortigi pacon. La publikigo, danke al vi, de *Unesko-Kuriero* en Esperanto pruvas bone, ke ni samopinias pri multaj aferoj.

Tamen mi bedaŭras, ke mi devas anonci al vi, ke la Ĝenerala Direktorino ne povos partopreni en la Kongreso de 2021 pro aliaj devoj de longa tempo jam deciditaj.

Mi volas certigi vin, ke Unesko konsideras kun plej alta graveco la laboron faritan de UEA kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kies prezidanto vi estas. Ĉiuj oficejoj de Unesko staras kompreneble je via dispono por plani kun vi novajn formojn de kunlaboro ĉirkaŭ niaj komunaj perspektivoj.

Kun ripetitaj dankoj pro via invito, mi petas vin akcepti mian plej altan respekton.

Tawfik Jelassi